

Grado

En *Grado* la unuaj homaj establiĝoj datiĝas de la 4^a jarmilo a.K., sed la urbo mem naskiĝis kiel halthaveno de *Aquileia* en la jaro 181^a a.K.: *Gradus*, latine=unua albordiĝo.

Dum la 5^a jarcento, pro la invadoj de la orientaj popoloj, ĝi fariĝis rifuĝejo por la firmgrundaj loĝantoj. Tiu malgranda vilaĝo, kiu tiamaniere kapablis certigi pluvivon al *Aquileia*, pligrandiĝis kaj transformiĝis al urbeto de fiŝkaptistoj: ĉi tien transloĝiĝis Patriarkoj, kiuj ĉefrolis dum la historiaj eventoj de la sekvaj jarcentoj.



Spurojn de la dominado de la potenca Venecio oni retrovas en la koloroj de la domoj ĉe la kanalo-haveno, en tiuj arboj kreskantaj en la placetoj, kies origina nomo estas “*campielli*” [kampielli], en la etoso de ties *calli* [kalli], nome stratetoj, kaj en la dialekto tipe veneta.



Indas vizito de la Baziliko Sankta Eŭfemio: ventoflaga ĉefanĝelo, alta 2,80 metrojn, fandita en 1462, superrigardas la urbeton de la pinto de la 4-jarcenta sonorilejo, apudanta la Bazilikon. Konsekrita jam en 579, ĝi estis episkopejo ĝis duone de la 14^a jc, kvankam la akutala strukturo devenas de restaŭro farita ekde 1939 ĝis 1951, surbaze de la diversaj modifoj faritaj dum la pasintaj jarcentoj. Aparta atento meritas la mozaikan pavimon (6^a jc) kaj predikejon, starigitan sur romiaj kolonoj kun la simboloj de la Evangeliistoj (11^a jc). Apud la preĝejo admireblas

Ŝtongravuraĵejo, kun romiaj kaj paleokristanaj restaĵoj kaj la Baptejo (5^a jc), je okangula plano kun sesangula baseno.

En ĝia proksimeco troviĝas la Baziliko Sankta Maria de l' Karitato, de la 4^a-5^a j, enhavanta samepokajn interesajn mozaikan pavimon kaj antaŭaltaran balustradon elegante skulptitan.

Grado restis nekonata ĝis 1800, kiam oni malkovris la kuracajn ecojn de ĝiaj akvoj kaj sabloj. Ĝi do ekde tiam fariĝas la kultura centro de la eŭropa elitmondo kaj al *Grado* ekvenadis la riĉaj, burĝaj turistoj, artistoj kaj nobeloj, ĉefe el norda Eŭropo. Interrompita la turista alfluo pro la dua mondmilito, post ĝi, iom post iom, la “Suna Insulo” refariĝis renoma turismejo, ankoraŭ nuntempe altiranta personojn el la tuta Eŭropo pro la belegaj plaĝoj, la fajna sablo, la varma suno.



Perboata vizito al *casoni* [kazoni] – tipaj ŝirmejoj starigitaj per marĉaj herboj sekigitaj, dise videblaj en la laguno – komprenigas kial la loĝantoj estas tiel strikte ligitaj al la cirkaŭanta medio.